

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

OFICIALA ORGANO DE LA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Aliĝinta al la Unuiĝo de la Belga Perioda Gazetaro

Direktoro :

**FRANS SCHOOFS, Kleine Hondstraat, 11
ANTVERPENO**

Por la anoncoj oni sin turnu al:

H. PETIAU, St. Lievenslaan, 60, GENTO.

ENHAVO. — XIVa Belga Esperanto - Kongreso. — Kanteto
— Diversaj Informoj. — Plezura Nokto (Fino). — Bibliografio.
por banjo. — Ekzameno pri profesora kapableco. — Ni gratulas.
Iom da Algebro.

JARA ABONPREZO : Fr. 10—

EKSTERLANDE : Fr. 12.50

ANTVERPENO

1925

KIAL KOMPLIKI VIAN LABORON ?...

Konfesu ke

la transformo de vortoj en "signojn", kaj posta reproduktado de tiuj samaj "signoj" denove en vortojn

estas duobla laboro

kaj vi komprenos jam, kial la

DICTAPHONE

estas la senpera metodo por diktado de la korespondadoj.

Petu la broŝuron:

"L'HOMME D'AFFAIRES AU BUREAU"

(La aferisto en la oficejo)

— Senpaga alsendo —

ROBERT CLAESEN

Fako: ES

20, rue Neuve,

BRUSELO.

Tel.: 106,82

V. & L. De Baerdemaecker

GENTO, 25 & 31, rue Fiévé, GENTO

Sipmakleristoj. — Komisiistoj. — Ekspedistoj.

Doganaj agentoj. — Enmagazena tenado.

Agentoj de

Goole Steam Shipping - London Midland - kaj Scottish Railway Co.

Du servoj } inter GENTO kaj GOOLE kaj returne.
ĉiusemajne }

komunikigantaj kun Centra kaj Norda Anglujo kaj Irlando

HULL dum la sezono de la fruktoj.

Grupiga servo al Svislando kaj Italujo, Nord- kaj Orienta parto de Francujo, Germanujo, Holando kaj Balkanoj.

Magazenoj kaj deponejoj akceptitaj de la "Comptoir d'Escompte" de la Nacia Banko.

Telegr. adreso: DEBAER. — Telefonoj 188 - 92 - 1500 - 1515.

BANQUE DE FLANDRE

ANONIMA SOCIETO EN GENT - FONDITA EN 1847

Deponaj kaj duonmonataj kontoj

Diskonto kaj enkasigo de biloj

Kreditleteroj

Konservado de obligacioj kaj titoloj

Aĉeto kaj vendo de obligacioj

Pruntedono sur obligacioj

Enkasigo de kuponoj

Luigo de monkestoj

ĈIAJ BANKAFEROJ.

Nederlandsche Gist- & Spiritusfabriek

(Nederlanda Fabriko de Fermento kaj Alkoholo)

ANONIMA SOCIETO

Societa Sidejo: **DELFT** (Nederlando)

Fabrikejo: **BRUGES-BASSINS** (Belgujo)

Filioj: **BRUSELO** kaj **HUY** (Belgujo)

Produktajoj:

Rega Fermento

Alkoholo kaj Brando

Eldistilaj Rekrementoj

Fako "Fermento kaj Rekrementoj": Bruges-Bassins

Fako "Alkoholo kaj Brando": 378, Av. Van Volxem, Bruselo

Telefono: { Bruges N° 8
Bruxell. BR. 8338
Huy N° 40 } { Bruxelles
Bruges
Huy } "Gistfabriek"

ESPERANTO IN EEN OOGSLAG!

ESPERANTO is
INTERNETISCH.

alle letters
uiggesproken:

een letter
een klank

EMTOON valt
op de voorlaatste
letter-reep.

regelmatigheden
uitzonderingen

HET ALPHABET VAN ESPERANTO

Aa	Bb	Cc	Ĉĉ	Dd	Ee	Ff	Gg
a	b	c	ĉ	d	e	f	g
Ĝĝ	Hh	Ĥĥ	Ii	Jj	Jĵ		
ĝ	h	ĥ	i	j	ĵ		
Kk	Ll	Mm	Nn	Oo	Pp	Rr	Ss
k	l	m	n	o	p	r	s
Ŝŝ	Tt	Uu	Ŭŭ	Vv	Zz		
ŝ	t	u	ŭ	v	z		
Q, W, X en Y bestaan niet.							
* trossche als in gant, jou							

A, E, I, O, U
hebben ongeveer den
klank als in
ja, re, mi, do, doek.
C klinkt niet gelijk
S of K, maar gelijk
ts in fiets of tsaar
heeft den klank van
t in ja
De klanken
ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ en ŭ
vindt men in tsjirpen,
John, lachen, jalappe,
ch colade en leeuw.

DE SPRAAKLEER bestaat uit ZESTIEN GRONDBEGEELSEN.

DE WOORDEN worden gevormd uit stammen door toevoeging van geschikte letters

de uitgang van het NAAMWOORD: HOEDANIGHEIDSWOORDEN eindigen op
fakto nbro evidenta bela
telefono tajro longa furioza
riano tasko granda simpla

WOORDEN en HOEDANIGHEIDSWOORDEN
vormen hun MEERVOUD door toevoeging van
evidentaj faktoj longaj telefonoj grandaj libroj

EENVOUDIGE TIJDEN VAN HET WERKWOORD WORDEN GEVORMD
DOOR SLECHTS ZES UITGANGEN

Leget u, tijd Verleden tijd Toekomende tijd Voorw wijze Geb. wijze.

AS IS OS US U

estis lernas instruas
estis lernas instruis
estos lernos instruas
estis lernas instruus
estu lernu instrui

print den ACCUSATIEF (rechtstreeksch voorwerp)
Mi (ĉe) instruas lin (ĉem)
Li (ĉi) instruas min (ĉin)
Vi lernas Esperanton

BIJWOORDEN eindigen op
rapide
entuziasme
aligente

ESTU PRETA: LERNU ESPERANTON

WOORDEN worden gebruikt als hoedanigheidswaarden naamwoorden en bijwoorden:

Bedijvend Tegenw ANT Verleden INT Toekomend ONT
Lij lend Tegenw AT Verleden IT Toekomend OT
Mi estas instruanta Mi estas la instruanto Mi estas la instruanto
Vi estas instruata Vi estas la instruato Vi estas la instruato

harpe	estas	iljo	melono	lundo
piano	instru	rozo	banano	kato
violono	mento?	tulipo	figo	kamelo
fluto		violo	piro	elefanto
orgeno		peranio	pomo	urso

ONS IS JES EN ONS NEEN IS NE

fakto	estas	simpla	mal	mal	KLEUREN
piano	(is)	granda	mal	mal	blanko papero
knabo	estas	bela	mal	mal	blua krujono
raporto	estas	favora	mal	mal	nigra inko
progreso	estas	rapida	mal	mal	bruna tero
anekdoto	(zal zijn)	longa	mal	mal	rozaĵ lipoj

WOORDEN: Unu, 1, du, 2, tri, 3, kvar, 4, kvin, 5, ses, sep, ok, naŭ, dek, cent, 100, milo, miliono, RANGSCHIEKKENDE TELW: unua klaso dua klaso, enz.

Bijwoorden: unue, ten eerste, due, tweede, enz.
VOEGSEL: IST dentiste fakisto artisto
VOEGSEL: Het VROUWELIJK GESLACHT wordt aangeduid door IN rince patrino leono rincino atrino leonino

andere voegsels en twintig andere achtervoegsels maken het mogelijk alle begrippen met juistheid uit te drukken.

BELGA LIGO ESPERANTISTA

FARU TUJ! KIAL PROKRASTI?

REPAGU vian kotizon-abonon (FR. 10.--)

por 1925

a) se vi estas

membro de loka ligita grupo:

AL LA KASISTO DE VIA GRUPO;

b) se vi estas

aparta membro-abonanto:

Al la kasisto de la Ligo:

S-RO F. MATHIEUX

94, AVENUE BEL-AIR, UCCLE - BRUSELO

POŝTĈEKO: NRO 39984

c) Eksterlandanoj

per poŝtmandato al la suprecitata kasisto de la Ligo.

BELGA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

Oficiala organo de la Belga Ligo Esperantista

Redakcia parto:

FRANS SCHOOFS
11, Kleine Hondstraat, Antwerpen
Telefono 543.74

Abonoj kaj Mensejoj

FERN MATHIEUX
94, Avenue Bel-Air, Uccle
Postceko No 39984.

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas. — La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.

BELGA LIGO ESPERANTISTA.

XIV^a Belga Esperanto-Kongreso

(VERVIERS, 30-31 MAJO KAJ 1 JUNIO 1925.)

Akceptante la inviton de niaj Verviersaj amikoj, la Ligestraro estis konvinkita, ke ili kapablos prezenti jarfeston, kiu certe superos ne nur unuan Belgan kongreson (organizitan en plena reforma batalo) de 1909, sed ankaŭ ĉiujn aliajn naciajn kunvenojn de tiam faritajn en nia lando.

Kaj ni tuj diru, ke la okazintaĵoj pravigis la fidon, kiun niaj gvidantoj havis pri la sindonemo kaj laboremo de la Komitato kaj membroj de la Verviersa grupo.

* * *

Sabate de antaŭ la 17a horo, la stabo de la organizanta societo estis reka en la akceptejo « Café des Pays Bas » (apud la Centra Pacidomo por bonvenigi la praksimume 150 gekongresanojn. En la taga salono, ĉiu akurate ricevis siajn dokumentojn, informojn pri la kongreso k.t.p. Tiu ĉi laboro, kiu antaŭe tre ofte estis kaŭzo de plendoj, kritikoj kaj malkontentigoj, plej bonorde plenumiĝis ĉar detale kaj zorge preparita estis ĉio, malgraŭ tio, ke, kiel kutime, multaj partoprenantoj nur lastmomente sendis sian aliĝilon.

Je la 20a en la sama loko la kongresanoj estis akceptataj de la « Chambre des Métiers et Négoces » de Verviers. Multaj komitatanoj kaj membroj de tiu grava loka komerc-industria organizado esprimis per sia ĝojo sian simpatian al nia movado. S-ro Brion, prezidanto, bonvenigis la Esperantistojn kaj deziris grandan sukceson al iliaj klopodoj.

S-ro Jos. Pirnay, urba konsilanto, sekretario de la akceptanta ĉambro

kaj prezidanto de la loka grupo esperantista, akcentis la intereson, kiun portas la «Ch. d. M. et N.» al la demando pri internacia lingvo, kaj esprimis la deziron, ke baldaŭ estu starigata en Belgujo speciala komitato pri Esperanto kaj komerco, kiel jam ekzistas en kelkaj aliaj landoj. Li invitis ĉiujn ĉeestantojn malpleniĝi pokalon da honorvino je la estontaj sukcesoj de Esperanto.

S-ro Cogen, je la nomo de la kongresanoj, varme dankis pro la kora akcepto la «Ch. d. M. et N.».

S-ro Abato Ĉe, el Bukarest, delegito de la Rumana Ministro pri Komercio, kaj sendito de la Centra Komitato de la Esperantista movado, longe parolis interesplene kaj plej humore pri la signifo de Esperanto kaj pri ĝia utilo por ĉiuj homoj sur la tero tiel same laŭ intelektaj kiel laŭ komercaj rilatoj. Multfoje interrompata per aplaŭdoj de la ĉeestantoj, tiu parolado estis tre lerte kaj flue tradukita en francan lingvon de nia amiko Ivan Delhez, sekretario de la Verviersa grupo. Ĉi tiu samideano pro tiu malfacila tasko estis plej danke gratulata de S-ro Cogen kaj akklamata de ĉiuj.

Tiu unua prepara kunveno plej favore impresis la partoprenantojn, esperantistajn kaj neesperantistajn... kaj tre certe neniam resonadis tiel malfrue dumnokte en Verviers la harmonia lingvo internacia.

* * *

La dimanĉan tagon superradiis brilanta suno. Je la 10a horo la verd-stelana paca bataliono estis preta por ekmarŝi al la urbodomo, kie okazos oficiala akcepto organizita de la urbestro. Kondukita de kelkaj grupaj standardoj, la kongresanaro promenadis tra la ĉefaj stratoj kaj alvenis je la 10 1/2 h. al la urbestrarejo, ĉe kies fasado gaje flirtis la naciaj flagoj de ĉiuj landoj reprezentataj.

En la «Reĝa salono» S-ro urbestro L. Defays, S-roj skabenoj C. Simon, Pirard, H. Tiberghien, urbaj konsilantoj Hosay, Bonjean, Cardol, provinca konsilanto Fr. Grün (tre malnova amiko de Esperanto) kaj sekretario Nison, akceptis oficiale la kongresanojn, kiujn prezentis nia amiko Jos. Pirnay, urba konsilanto. Ĉi tiu dankis la urbestaron pro la enkonduko de nia lingvo en la kursoj de la 4a-grada instruado kaj pro tio, ke ĝi akceptis la patronecon de nia kongreso. Li atentigis pri la partopreno en nia festo de rumanaj, francaj, nederlandaj, anglaj kaj polaj Esperantistoj.

S-ro vicprezidanto L. Cogen prezentis gravan paroladon. Tiun interesplenan dokumenton ni presigas plentekste en proksima numero.

Post atenta aŭskultado S-ro urbestro Defays, komence en Esperanto, poste en franca lingvo, jene respondis:

Mesdames, Messieurs,

Je ne saurais mieux vous exprimer la sympathie que j'éprouve pour l'œuvre entreprise par votre groupement qu'en me servant de sa langue. C'est avec amertume que j'avoue mon regret de ne pas l'avoir étudiée; mais c'est avec une profonde satisfaction que je parviens, après quelques instants d'attention, à m'exprimer en

«Espéranto», faisant ainsi la preuve la plus éloquente de sa facilité d'assimilation.

Puisse cet aveu contribuer à l'expansion de votre propagande, dont la réussite à présent incontestable, est appelée à donner à nos rapports internationaux une ampleur et une facilité inappréciables.

Votre honorable président a bien voulu nous rappeler que la Ville de Verviers fut en quelque sorte le berceau de l'Espérantisme en Belgique. Je suis fier de pouvoir épingler ce souvenir et de vous réserver un accueil aussi cordial que celui qui vous fut fait ici en Juin 1909 à l'occasion de votre premier Congrès National. Et c'est avec une profonde satisfaction que je puis me convaincre dès aujourd'hui des progrès énormes accomplis par votre œuvre, dont l'épanouissement et l'influence éminemment bienfaisante sont un fait accompli.

Une telle conclusion est pleinement justifiée, en présence des faits qui viennent de nous être révélés par votre porte-parole; nous nous en réjouissons de tout cœur.

Laissez moi y ajouter une constatation personnelle que je viens de faire en lisant, il y a deux jours «Le Matin» de Paris. Le Ministre du Commerce et de l'Industrie, dans l'intention de donner à la clientèle du télégraphe une facilité nouvelle pour la préparation de sa correspondance, a décidé d'admettre l'usage de la langue auxiliaire «Espéranto» pour la rédaction en langage clair du régime intérieur.

Mesdames et Messieurs,


Un succès considérable a donc déjà récompensé les nobles efforts si largement déployés par vos vaillants organisateurs, tant au point de vue des relations internationales que de la vie intérieure des nations. Nul doute qu'ils s'accroissent sans cesse, et que dans un avenir prochain, il atteigne les proportions d'un véritable triomphe.

C'est dans cette pensée qu'au nom de l'administration communale je vous adresse à tous mes plus chaleureuses félicitations et que je forme les vœux les plus ardents pour la réussite de votre congrès.

S-ro Louis Pirard, skabeno pri instruado, aldonas kelkajn vortojn. Li diras ke, akceptante la esperantistojn, la Verviersa urbestro de 1909 al tiu de 1925 deziris montri sian favoron al nia movado, pruvante per tute simple, ke ĝi havas sanan kompremon pri la nuntempaj bezonoj. La rolo de internacia lingvo povas esti ja tre efika kaj multe influa pacigon de la tuta homaro, ne parolante pri la jam nun konstatablaj antaĝoj rezultantaj el la faciligo de la rilatoj ekonomiaj, sociaj aŭ reĝiaj. La urbestro ĉiam faros sian eblon por helpi la esperantistojn. Ne necese estas diri, ke la du eminentaj parolintoj estis estuziasme aplaudataj.

Dum oni trinkas la oficialan honorvinon, S-ro Abatao Ĉe, en Esperanto, pledas elokvente por nia lingvo, kiu havas tiel grandan utilon por la malgrandaj orientaj nacioj. S-ro I. Delhez denove plej facile kaj precize tradukas.

* * *



La 14-a Belga Kongreso de Esperanto en Verviers.

La ĝenerala kunsido de Belga Ligo Esperantista okazis je la 11a h. en la konferenca salonego de la Popola Universato «La Mutuelle». Krom cento da gemembroj, ĝin ĉeestis S-roj C. Simon, skabeno, Hosay, urba

nsilanto, Nison, urba sekretario, Grün, provinca konsilanto, Ach. Simon, direktoro de la urbaj lernejoj, Max Simon, prezidanto de la Societo de Amercevojaĝistoj, Schiervel, delegito de la Ĉambro de metioj kaj ne...

La estraran tablon okupis S-roj L. Cogen (Ninove) prezidanto; L. Champy (Antverpeno) vicprezidanto; H. Petiau (Gento) ĝenerala sekretario; F. Schoofs (Antverpeno) direktoro de «B. E.»; urba konsilanto Pirnay, komitatano, kaj diversaj alilandaj delegitoj.

S-ro Cogen malfermas la kunsidon kaj legas jenan paroladon:
Karaj Geamikoj,

Vi retrovas min hodiaŭ denove kiel Kongresa Prezidanto, ĉar antaŭ deko da tagoj nur, nia amata Amiko kaj Liga Prezidanto Witteryck sciigis al mi ke pro sia ŝanceliĝanta farto li ne povus vojaĝi al Verviers, kaj samtempe li petis min, ke mi anstataŭu lin. Tion mi senhezite faris kun plezuro, ĉar tiel mi utilas al li, sed samtempe kun ĉagreno, ĉar pro tio ni denove ne havas la ŝancon vidi ĉi tie nian bonegan samideanon; kaj mi esprimas certe ĉies ideon, kiam mi proponas, ke ni sendu al li telegramon de kora saluto de ĉiuj gekongresanoj, ĉu ne?

Jen ni, estimataj geamikoj, kunvenintaj el ĉiuj belgaj provincoj kaj eĉ el kelkaj fremdaj landoj, por festi nian XIVan ĉiujaran solenan belgan festotagon. Mi diras al vi ĉiuj, diverslandaj kaj belgaj gesamideanoj, tre koran bonvenon en ĉi tiu kongreso, kiu disŝutu en la regiono Verviers - Spa, la bonan grenon plej senŝpare por la diskonigo de nia kara idealo kaj ĝia posta disvastiĝo.

Tute specialan saluton en ĉi tiu ĝenerala kunveno ni ŝuldas al Sinjoro skabeno Casimir Simon, al S-ro Lambion, prezidanto de «La Mutuelle», al S-ro Achille Simon, direktoro de la publikaj lernejoj. Estas la unuan fojon, ke oficialaj personoj faras al ni la grandan honoron ĉeesti nian laboran kunvenon kaj venas tiel pligrandigi nian kuraĝon kaj nian entuziasmon. Je via nomo, Gekongresanoj, mi tutkore dankas tiujn Sinjorojn kaj mi esprimas la esperon, ke ili de tie ĉi kunportos la konvinkon ne nur, ke lingvo internacia estas uzebla kaj necesa, sed ankaŭ ke Esperanto estas la solvo de la problemo kaj ke Esperanto estas lingvo belsona, lingvo facila, lingvo utila kaj praktika, kapabla esprimi ĉiujn ideojn kaj eĉ la plej delikatajn nuancojn de la ideoj.

Specialan saluton de bonveno, ni ŝuldas ankaŭ, karaj geamikoj, al nia fervorega samideano, Lia Abata Moŝto Ĉe, kiu faras al ni la grandan honoron kaj plezuron ĉeesti nian kongreson. Vi scias ĉiuj kiel senlaca kaj kuraĝega propagandanto de nia entrepreno eestas nia samideano Ĉe kiu vojaĝas de lando al lando por disjeti la bonan semon. Hodiaŭ li venas kuraĝigi nin kaj profitigi je sia granda sperto. Pro tio je via nomo, mi gratulas kaj samtempe dankas lin.

Sed nia sento de tre sincera danko iru ankaŭ al ĉiuj geamikoj

kaj al ĉiuj ceteraj personoj kun ni simpatiantaj, kaj kiuj ebligis kaj preparis por nia utilo kaj nia plezuro la diversajn partojn de nia kongreso. Unue, al ĉiuj geklubanoj de la Verviers'a grupo kaj al la Spa'aj geamikoj, due al la Urbeŝtraroj de ambaŭ kongresaj urboj Verviers kaj Spa, kiuj faras al ni la honoron akcepti nin en siaj urbdomoj kaj tiel apogas oficiale nian movadon, trie al la komitatoj de la Societoj «La Mutuelle» kaj «L'Emulation» kiuj pruntedonas al ni aminde siajn sidejojn por niaj kunvenoj laboraj kaj festaj, kaj kvare, al ĉiuj ceteraj gebonveluloj, kiujn mi povus esti ne jam menciinta.

Kaj nun, antaŭ ol paroli pri la Esperanta afero mem, ni dum momento pie enpenŝigu kaj donu kortuŝan rememorigon al la gesamideanoj je eterne forlasintaj nin. La Bruĝa Grupo estis trafita je diversaj funebroj pro formortigo de membroj; ankaŭ la Verviers'a Grupo perdis sian ŝatatan Honoran Prezidanton, -Sron Spinhayer; ni kondolencu kun niaj ambaŭurbaj geamikoj kaj deziru pacan ripozon al la mortintoj, kiuj dum sia vivo bone meritis je nia movado pro sia propagandemeco kaj favorigo. Ni ankaŭ ne forgesu ĉefe, ke la tuta Esperantistaro malĝoje funebriŝis pro la morto de la vidvino de nia Majstro, Sinjorino Klara Zamenhof-Silbernik, la bonega vivkunulino de la aŭtoro de nia lingvo, ŝi, al kiu ni duone ŝuldas la sukceson de nia movado, ĉar se nia nemortebla Zamenhof konstruis Esperanton, ŝi konstante instigis al li la kuraĝon por komenci kaj daŭrigi la bataladon por ĝia enkonduko en la mondon kaj disvastigado tra ĝi. Dormu ŝi nun pace, flanke de sia glora edzo. Al ŝi, la bedaŭregata mortintino, nia plej kara rememorigo.

Post tiu halto ĉe niaj foririntaj gekaruloj, ni ree eniru la realan mondon, kaj, se ni volus karakterizi la hodiaŭan kongreson, ŝajnas al mi, ke ni rajtus kvalifiki ĝin kiel «la kongreso de la ĝoja espero». Efektive, kiel mi ĵus diris en la urbdomo multaj ĝojigaj faktoj okazis ne nur en la Esperantista movado mem, sed ekster ĝi, okazintaĵoj, kiuj montras ke, krom la Esperantistoj, la kondukantoj de la granda publiko, ĉu en pedagogia, ĉu en komerca kaj industria, ĉu en scienca, ĉu eĉ en ŝtata fako, komencas ŝati laŭ valoro, nian idealojn kaj interesiĝi serioze je ĝi! Sed eble unu el la ĉefaj faktoroj de nia baldaŭa triumfo estas la laste aperinta el ili: la radiofonio! Vi ĉiuj scias kian grandegan sukceson akiris rapide ĉe la tutmonda publiko tiu nova komunikilo; sed precize pro ĝi la «muroj de miljaroj starantaj inter la popoloj dividitaj» ekaltigis siajn «obstinajn barojn»... en niaj domoj mem! Kiom da fojoj okazis jam al mi, ke iu aŭ alia radiofoniisto diras al mi: «Kia bela eltrovaĵo! Komforte sidante en sia apogseĝo, oni ĝuas je koncertoj, paroladoj, teatraĵoj, k. t. p., jen de Bruselo, jen de Parizo, jen de Londono, de Romo, de Berlino, k. c.; sed io estas malagrabla: kiam estas uzata fremda lingvo, kvankam mi ĝin ja

bone konas, mi tamen ne komprenas la parolanton?» Jen malkovrita plej trafe la malhelpanta diverslingva barilo! Kaj ĝi pli kaj pli pligravigos kun la kreskanta sukceso de la radiofonio, kaj tial ĉi tiu lasta pli kaj pli fariĝos la ĉefa faktoro de nia fina triumfo. La entuziasmo por nia lingvo kaj ĝia granda sukceso en la 1a Internacia Kongreso de la Radiofoniaj Federacioj tutmondaj, okazinta en Parizo dum la nunjaraj Paskaj tagoj, kaj ankaŭ en la radiofoniaj revuoj, do tute ne estas mirigaj! Male!

Alia simptomo tre favora estas, la ĉiutage kreskanta intereso de la gazetaro por nia entrepreno. Estinttempe, tre malmultaj estis la gazetoj kiuj konsentis publikigi ian seriozan artikolon pri nia lingvo.

Sed tre ofte okazis, ke nesciegantaj redaktoroj publikigis pri nia afero mokojn kaj ridindajn stultaĵojn, kaj tiel senskrupule trompis la publikon. Nun tio multe pliboniĝis; ili eksentas, ke nia lingvo vere miksiĝas ĉiutage pli kaj pli en ĉiuj homaj agadoj, kaj ili rilatas pli singarde kaj pli juste kontraŭ ĝi. Dum la lastaj monatoj diversaj el la ĉefaj belgaj ĵurnaloj enpresis arojn da artikoloj tre seriozaj pri Esperanto, kaj komunikaĵojn pri ĝiaj manifestadoj en diversaj fakoj. Ni legas ekzemple, regule en la rubriko T. S. F., pri kursoj, paroladoj, kantoj elsendotaj de la diversaj stacioj.

Ĉu ĉio tio ne estas ĝojega, karaj geamikoj? Ĉu mi ne estis prava dirante al la Urbeŝtraro, ke neniam la batalado por nia movado estis pli kuraĝiga ol nun, kaj ĉu mi ankaŭ ne estis prava, kiam mi kvalifikis nian nunan kongreson kiel tiun de la «ĝoja espero»?

Mi do ĝoje malfermas ĉi tiun kongresan kunvenon. Mi deziras, karaj geamikoj, ke vi, en la ĉi tiea Esperantujo, avide enspiros la vigligan Esperantan aeron kaj ke vi reiros en viajn reciprokajn hejmojn, kun ĝojaj koroj, kun plifortikigita konvinko pri la utilegeco de nia idealo, kun firma decido rekomenci la bonan bataladon kun renovigitaj fortoj kaj obstino.

Vivu do nia XIVa en Verviers kaj en Spa!

S-ro Cogen laŭlegas sekvan telegramon:

Al Sinjoro Witteryck — Steenbrugge:

Dekkvara belga kongreso salutas ligan prezidanton al kiu estas kore dezirata baldaŭa bona sano —

kiu, post longa aklamo, estos forsendita.

S-ro H. Petiau, Ĝenerala Sekretario, prezentas sian raporton pri la liga agado dum la pasinta jaro:

Estimataj Gesamideanoj!

Mi tre deziris ree danki niajn Bruĝajn geamikojn, kiuj tiel bone organigis la lastan kongreson kaj havigis al la kongresanojn tiel agra-

blan restadon en sia ŭrbo kaj ĉe la marbordo, kie ili ĉerpis novajn fort-ojn por daŭrigi nian pacan bataladon; kaj la batalado daŭradis!

Nova grupo fondiĝis en Sankta Nikolao kaj mi deziras al ĝi longan kaj tre prosperan vivadon.

La grupa agado fukciis normale; multaj novaj kursoj estis ĉie organizataj kun plena sukceso, precipe en Antverpeno, Bruĝo kaj Verviers.

En Antverpeno, Ledeborg, Mehleno kaj Verviers, la kursoj oficiale organizitaj de tiuj komunumoj okazis kun pli kaj pli da sukceso.

Malgraŭ ĉiuj klopodoj ni ne sukcesis aranĝi, ke «Belga Esperantisto» regule aperu; la malbonaj cirkonstancoj estis pli fortaj ol nia bonvolemo! Sed nun, novaj aranĝoj estas alprenitaj kaj ni povas esperi, ke estonte via revuo aperos regule ĉiumonate; ke tiuj kiuj ĝis nun ne rebonis ĝin, bonvolu tuj fari la neceson, por ebligi regulan eldonadon.

Mi ne povas preterlasi atentigi vin pri la internacia komerca eksperimento organizita de la «Konstanta Re prezentantaro» de nia movado (K. R.). «Verda Stelo» kaj «Antverpena Grupo» kaj «Genta Grupo» partoprenis tiun eksperimenton kaj organizis specialan kurson por komercistoj. Antaŭ ol komenci tiun eksperimenton la organizintoj unue klopodis por ke ĝi okazu sub la patronado de la komercaj institucioj kaj ili atingis ne-esperitan rezulton, precipe en Antverpeno kie la industri kaj komerca ĉambro kaj la ĉefaj komercaj asocioj akceptis patronadi la kurson. En Gento, honora komitato estis starigita, kiu konsistis el la prezidantoj de la komerca ĉambro, de kelkaj grandaj industriaj organizaĵoj kaj de la «Asocio de la Belgaj Florkulturistoj». Sub tia protekto la du kursoj bone sukcesis kaj la rezultato estas tre kontentiga. Unuafoje ni havis la okazon atentigi serioze la industriajn kaj komercan rondon pri la utileco de Esperanto kaj la bona rezultato atingita en Antverpeno kaj Gento igas min bedaŭri, ke en la aliaj urboj oni ne partoprenis la eksperimenton. Sed nenio estas perdita.

La internacia komerca konferenco, kiu ĵus okazis en Parizo donas al ni novan okazon altiri la atenton de la komercisto al nia movado. Tiu konferenco, kiu okazis sub la aŭspicoj de la Komerca Ĉambro kaj de la Komerca Foiro de Paris, akiris grandegan sukceson. Pli ol 150 komercaj Ĉambroj kaj ĉirkaŭ 200 komercaj kaj turismaj institucioj el 32 diversaj landoj aliĝis al la konferenco, kiu estis tre interesa. La komercaj ĉambroj el Antverpeno, Arlon, Gento kaj Verviers estis reprezentataj same kiel kelkaj aliaj belgaj komercaj organismoj.

S-ro Chaumet, la franca ministro de l'komerco, tre favora al Esperanto, for el Parizo dum la konferenco anstataŭigis sin de sia Sekretario, kiu prezidis la malferman kunsidon kaj partoprenis en la laboroj de la konferenco. Siaflanke, S-ro Painlevé, Ĉefministro, tre fervora Esperantisto, sendis delegiton por anonci al la konferenco ke la franca registaro ĵus decidis akcepti Esperanton kiel klaran lingvon en la internaj telegrafaj rilatoj kaj promenis proponi dum la proksima internacia konferenco de la telegrafoj, ke nia lingvo estu oficiale akceptata en

la internaciaj telegrafaj rilatoj. S-ro Painlevé ankaŭ promesis rekomendi la akcepton de Esperanto en la Ligo de Nacioj.

La scienca konferenco, kiu okazis samtempe en Parizo ankaŭ tre bone sukcesis; multaj scienculoj el ĉiuj landoj ĝin ĉeestis kaj la malferma kunsido en la Sorbonne (Pariza ŝtata universitato) estis tre impona. Ĝin prezidis S-ro Richet, la fama kuracisto, profesoro en la Sorbonne kaj membro de la Franca Instituto, ĉirkaŭata de multaj scienculoj francaj kaj alilandaj. La paroladoj faritaj de la diversaj scienculoj estis ege interesaj kaj tre favore influis al nia afero la multnombra publikon kiu ĉeestis la kunvenon.

Jen, karaj geamikoj, aro da bonaj novaĵoj kiuj instigos vin labori kun nova kuraĝo por la fina venko de nia afero!

Kaj nun permesu, ke mi deziru al viaj laboroj plej bonan sukceson. Mi ne dubas, ke vi pasigos du agrablajn tagojn en Esperantujo dank'al la konata afableco de niaj Verviers'aj amikoj, kiuj de preskaŭ unu jaro laboradis por organizi agrablan kongreson kaj mi estas certa, konante ilian praktikon organizemon, ke ili plene sukcesos. Mi tutkore dankas ilin je l'nomo de la Ligo pro tiu nova provo de sindonemo al nia afero kaj mi deziris, ke vi rekompencu ilin per praktika kaj fruktedona laboro!

Dankon al niaj Verviers'aj amikoj, sukceson al nia XIVa kaj
Vivu Esperanto!

HENRI PETIAU.

* * *

S-ro Petiau, senkulpigas S-ron Mathieux, kiu pro neantaŭvideblaj cirkonstancoj, lastmomente, estis malhelpita veturi al nia kongreso. Li tamen sendis jenan raporton pri la financa stato de la Ligo:

Karaj Gesamideanoj,

Kun granda plezuro mi sciigas al vi, ke dum la lasta jaro, nia financa situacio iom pliboniĝis.

Pro la pliatigo de la kotizaĵoj, mi ricevis de izolitaj membroj kaj de la grupoj ĉirkaŭ 600 frankojn, anstataŭ 250 dum 1923.

La nombro de la abonantoj al «Belga Esperantisto» pligrandiĝis (ĉirkaŭ 60 pli ol dum 1923).

Sed la plej efikan helpon mi ŝuldas al la iniciativo de nia amiko Petiau kiu reorganizis la servon de la anoncoj en nia revuo. Dank'al li, mi enkasigis preskaŭ 1500 frankojn.

La fina bilanco de la jaro montras profiton de 1228.85 frankoj.

Mi esperas ke tiun ĉi jaron, ni daŭrigos la progresadon kaj ke tiamaniere ni akiros la necesajn rimedojn por organizi ĝeneralan propagadon.

La kasisto de B. L. E.
F. MATHIEUX.

* * *

S-ro CAM. BABILON (Visé), komitatano, memorigas la ĉeestantaron pri la bona akcepto, kiun pasintan jaron la kongresanoj rezervis al la propono de S-ro J. Pirnay pri kongresa monkollekto por nia Liga kaso. Elokvente, li alvokas la sindonemon de la kunvenintoj kaj esperas, ke ili volus malavare refari la lastjaran geston.

Post aproba aklamado, kelkaj bonvolemaj fraŭlinoj kolektas en la salono sumon de Fr. 206.60 pro kiu la prezidanto varme dankas.

S-ro H. PETIAU legas salutleterojn kaj telegramojn de:
S-ro A. J. Witteryck, Prezidanto de Belga Ligo Esperantista;
S-ro Edmond Privat, Prezidanto de Centra Internacia Komitato;
Brita Esperantista Asocio, Londono;
Internacia Radio - Asocio, Londono;
Hungara Esperanto - Instituto, Budapeŝt;
S-ro P. Balkanyi, ĉefdelegito de U. E. A. por Hungarujo;
S-ro Ad. Oberrotman, delegito de U. E. A. en Varsovio;
Pastro I. Ŝirjaev, Baklanka, Rusujo;
S-ino Elworthy - Posenauer, Marienburg - Antverpeno;
Poresperanto Antverpena propaganda Komitato;
S-ro D. Hallet, eldonanta de «Guides Industriels Belges», Bruselo.

S-ro COGEN prezentas du raportojn de li verkitajn:

- 1) pri la Belga Festorganiza Klubo;
- 2) pri la Reciproka utileco de Esperanto kaj Stenografio.

La kunveno decidis, ke la plena teksto de ĉi tiuj raportoj estas publikigataj en «B. E.» kaj akceptas unuanime jenan rezolucion:

Por helpi la normalan disvastigon de Esperanto, estas dezirinde ke ĉiuj Esperantistaj organismoj instigu siajn membrojn al lernado de Esperanta stenografio; aliparte, por pligrandigi la profesion valoron de la stenografiistaro, estas dezirinde ke ĉiuj stenografiistaj Societoj instigu siajn membrojn al lernado de Esperanto.

Tiam la prezidanto donas la parolvicon al la alilandaj delegitoj. Salutas la kongreson:

S-ro BOONE (franco), S-ino Mc LEOD (brito), S-ino BRAMKAMP (nederlandano), S-ro HARLAMB (ruso).

Fine, S-ro CE, je la nomo de la Internacia Centra Komitato kaj U. E. A., alportas koran saluton el ĉiuj jam vizititaj landoj kaj urboj. Li faras elokventan pledadon por ke la esperantistoj ĉie energie subtenu niajn centrajn organizaĵojn, kaj precipe, ke ili aliĝu al U. E. A. granda asocio de praktika uzo de nia lingvo. Li multe kaj plej interesplene rakontas pri spertoj de li faritaj dum lia propagandista «kariero».

Denove S-ro CE rikoltas grandan sukceson pro lia alparolo klara kaj agrable miksitaj per amuzaj anekdotoj.

S-ro COGEN, demandinte, ĉu iu petas ankoraŭ la parolvicon, dankas la fremdajn gastojn kaj ĉiujn ĉeestintojn. Poste li fermas la kunsidon.

* * *

LA FESTENO.

Je la 14a h. atendis nin la Festeno, en kiu partoprenis preskaŭ ĉiuj kongresanoj. Ĝi okazis en granda kaj bele ornamita salono «L'Emulation».

Ĉe la «honortablo» havis sian lokon: S-ro Cogen, je kies dekstra flanko sidis: S-roj David, deputito, Petiau, Hoen, deputito, Schoofs, Ĉe, Lambion, prezidanto de la «Mutuelle»; je lia maldekstra mano: S-roj Niezette, deputito, Champy, F. Grün, provinca konsilanto, F-ino Thooris, prezidantino de la Bruĝa Grupo, -S-ro Nison, urba sekretario, Pirnay, konsilanto, Beaupain, sekretario de la Ĉambro de Komerco kaj Industrio, M. Simon, del. de Soc. de Komercaj vojaĝantoj, Schiervel, de la Ĉambro de Metioj kaj Negocoj, la redaktoroj de la kvar lokaj ĵurnaloj: «Le Courrier du Soir», «Le Jour», «Le Travail», «L'Union Libérale».

La manĝkarto anoncis: «Tomata Supo — Reĝinaj pasteĉoj — Lum-baĵo kun fungoj — Naturaj terpomoj — Ŝinko — Salato — Kremkukoj — 1/2 botelo da ruĝa vino».

La manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estis bonaj kaj la servado zorge organizita. Dum la tuta festeno regis frata kaj gaja atmosfero. La honora tablo estis vasta kampo de propaganda agado pro la ĉeesto de tiom multe de varbotaj oficialaj eminentuloj.

Je la deserto eksplodis la toasto:

S-ro L. Cogen prezentas jenan toaston al la Gereĝoj kaj al la Verviers'a Urbestro:

Dum nia ĉiujara festeno vi ĉiam atendas la alvenon de l'momento de la unua toasto, de la toasto al nia Reĝo, al nia Reĝino, al nia Gereĝa Familio!

Ĝeamikoj, vi scias kiom favora al nia movado estas nia Reĝo kaj per kiaj plezurplenaj kaj admirindaj vortoj li ĉiujare respondas al niaj telegramoj!

Ni renovigu hodiaŭ nian senton de simpatio al nia Regnestro levante niajn pokalojn je Lia honoro kaj je tiu de Lia Familio! (Aplaŭdo) ... kaj por ke nia unua belga civitano memoriĝu pri nia Esperantista entrepreno, mi proponas, ke ni sendu al Li jenan telegramon:

A Sa Majesté, Roi des Belges,

Sire, les Espérantistes belges réunis en leur quatorzième Congrès à Verviers viennent d'acclamer un toast glorifiant votre Majesté ainsi que sa Majesté la Reine et la Famille Royale. — Le Président: L. Cogen. (1)

(1) Respondo ricevita:

Monsieur Cogen, Président des Espérantistes belges,

Le Roi a été très touché du toast qui lui a été porté au cours du banquet des Espérantistes belges. Sa Majesté, très sensible aussi à vos gracieuses pensées pour la Reine et la famille Royale, m'a chargé de vous transmettre ainsi qu'à tous ceux qui se sont joints à vous, ses cordiaux remerciements.

5-6-1925. Chef Cabinet Roi.

Poste, S-ro Cogen diras:

Permettez-moi, Mesdames et Messieurs, de dire également à Messieurs les députés David, Hoen et Niezette, à Monsieur le conseiller provincial Grün, à M. l'avocat Beaupain, secrétaire de la Chambre de Commerce de Verviers, à M. Schiervel, délégué de la Chambre des Métiers et Négoce, à M. Max Simon, délégué de l'Association des Voyageurs de Commerce à M. Lambion, président de la Mutuelle, à M. Achille Simon, directeur des Ecoles publiques, combien nous nous réjouissons de les trouver parmi nous à ces agapes de la vraie fraternité, celle qui s'opère par le miracle de l'Unité du langage.

Messieurs, au nom des congressistes, je vous remercie de l'honneur que vous nous faites en participant à notre festin. A ceux d'entre vous que nous eûmes le plaisir de rencontrer déjà dans nos réunions de ce matin, je réitère, et à ceux que nous trouvons ici pour la première fois, j'adresse l'expression de notre grande sympathie et de notre vive reconnaissance pour l'encouragement officiel que nous ne saurions priser trop haut, pour l'encouragement officiel, dis-je, que vous nous prodiguez par votre participation à notre Congrès. Pour la cause de l'Espéranto, votre présence constitue l'approbation la plus précieuse et celle-ci ouvre à l'avenir du problème de la langue auxiliaire un horizon magnifique, plein des plus prometteuses réalisations pratiques et tangibles pour la plus grande utilité des relations internationales dans le domaine de la Science, du Commerce, de l'Industrie, du Tourisme, ou pour le dire d'une façon à la fois plus brève et plus complète, dans tous les domaines de l'activité humaine.

Nous tenons à vous déclarer, Messieurs, que nous conserverons le plus charmant des souvenirs de notre séjour dans la jolie ville de Verviers, ainsi que l'accueil si amical qui nous y est réservé de votre part.

Mesdames et Messieurs, je vous propose d'acclamer les représentants officiels qui sont venus participer à notre festin, et de vider vos verres en leur honneur et à leur santé!

S-ro HOEN, deputito, respondis je la nomo de la oficialaj personoj kiuj ĉeestis. Ilia ĉeesto ne nur estas elmonro de bonvolemo sed pruvo, ke ili alte ŝatas la iniciativon de la Esperantistoj, kiu enhavas promeson pri pacigo, pri feliĉo, pri amo. Ne estas pli efika ilo por sin helpi kaj kompreni unu la alian, ol komuna lingvo. Post la miloj da nun ekzistantaj - venos milionoj da estontaj adeptoj, kiuj igos Esperanton la gigantan levilon, kiu suprenlevos la mondon!

S-ro BEAUPAIN, Sekretario de la Ĉambro de Komercio kaj Industrio, senkulpigas sian prezidanton, S-ron Drèze, alportas la saluton de la komerca kaj industria rondoj de Verviers. Li insistas pri la profito kiujn havigos Esperanto, kaj trinkas je la bonaj rezultatoj al la klo-

podoj de la Esperantistoj kaj je la baldaŭa realigo de ilia humaneca kaj frateca idealo.

S-ro MAX SIMON, je la nomo de la Societo de Komerc-vojaĝantoj de Verviers, legas jenan deziresprimon de sia Societo:

La «Société des Voyageurs de Commerce de Verviers» komprenante la facilajojn, kiujn havigas Esperanto al la agentoj komisiataj prezenti siajn produktaĵojn en fremdaj landoj;

Konstatante, ke la kono de universala lingvo estas nepre necese al ili.

Esprimas la deziron, ke la instruado de tiu lingvo estu enkondukata en ĉiuj komercaj instruejoj.

S-ro LAMBION, prezidanto de «La Mutuelle», promesas ke tiu societo daŭrigos subteni ĉiurilate la klopodojn de la Verviersaj Esperantistoj. Li memorigas, ke la fondinto de lia organizaĵo estas S-ro Rob. Centner, kiu, antaŭ multaj jaroj, unu el la unuaj, lernis Esperanton kaj favore por ĝi laboris en Verviers.

S-ro PASTRO ANDERO ĈE, dankinte la oficialajn personojn, altanime kaj belforme parolis pri la grandaj servoj, kiujn alportos nia lingvo al la tuta mondo, ĉar ĝi permesos al ĉiu homo bonvola, kompreni unu la alian. Dank'al ĝi, la postaj generacioj havos pli serenan ekzistadon, pli harmonian vivon.

S-ro I. DELHEZ (ne, kara leganto, ĉi tiun fojon li ne tradukis: ĉiu ĉeestanto, eĉ ne Esperanton lernonta, bone komprenis kaj sentis la korajn vortojn de S-ro Ĉe!) faris toston al la Esperantistinoj, al kiu

S-ino BRAMKAMP respondis, proponante toston al la Sinjoroj.

F-ino THORIS proponis trinki je la sano de la membroj de la loka organiza Komitato, kiuj tiel bone kaj zorge aranĝis la unuan sennuban (eĉ vetere) kongreson. Ne necesas diri, ke tiu propono estis tondraplaŭde akceptita!

Fine S-ro J. PIRNAY, je la nomo de la organiza Komitato, dankis ĉiujn helpintojn kaj precipe la Urbestaron kaj la lokajn gazetojn, kiuj ĉiuj, senescepte, kore kunlaboris al la nun ĝuata sukceso.

* * *

Forlasinte la festenejon, la kongresnaro sin fotografigis kaj iris al la Muzeo Renier, kie nia malnova samideano J. Parotte gvidis kaj donis centojn da detaloj, respondis al milo da demandoj pri la interesaj objektoj arĥeologiaj kaj artaj kolektitaj en tiu interesplena muzeo.

(Daŭrigota.)

BELGA LIGO ESPERANTISTA

EKZAMENO PRI PROFESORA KAPABLECO.

La Belgaj Esperantistoj, kiuj deziras sin prezenti al la ekzameno pri profesora kapableco, sin anoncu jam de nun al la Sekretario de la Ligo, S-ro H. Petiau, St-Lievenslaan, 60, Gento.

KANTETO POR BANJO.

AL BANJO.

Ho rava la ludad' de banjo,
la stranga negra instrument';
ĝi estas ĝuo por la koro
kaj trilas kiel ama plend'.

el lando kun aliaj moroj
kaj kun alia religi':
la homoj tie salte dancas
je la honor' de sia di'...

Kun forta ritmo kaj kadenco
resonas ĝia ĉarma kant'; —
pejzaĝojn sorĉe ĝi vidigas
el milda, malproksima land'; —

Kaj ĉe l'vilaĝa palisaro.
sub ombroriĉa tamarin',
dum ie sonas banjoludo,
amajas negro kun negrin'.

Iilajn ambaŭ korojn kaptas
de l'amo la mistera sent'...

Ho rava la ludad' de banjo
la stranga negra instrument'...

JAN VAN SCHOOR.

NI GRATULAS

Fraŭlinon **Germaine De Boes**, nian bonegan propagandistinon el St. Niklaas, fratino de la senlace laboranta prezidanto de la tiea nova gru po «Al Triumfo», kiu edziniĝis la 9an de Junio kun **Sinjoro Guidon - Jules Van Haver**, kiu ankaŭ jam lernis nian lingvon.

Sano, feliĉo kaj prosperado estu ilia vivosorto!

DIVERSAJ INFORMOJ

MEHLENA GRUPO ESPERANTISTA sciigas, ke la anoncita tendaro (Vidu B. E. N° 5) ne okazos en Rymenam sed apud la lago de **Hofstade**.

Xa **KATOLIKA ESPERANTO - KONGRESO** okazos de la 13a ĝis la 16a de Aŭgusto en Parizo. Kelkaj episkopaj mostoj konsentis protekti ĝin. La ĉefa temo, kiun oni pritraktos, estas la katolika gazetararo, kiun Esperanto multe povas helpi. Multaj distraĵoj estas arangotaj por la kongresistoj. Kotizo estas Fr. fr. 25.— (Valoranta por ĉiuj kongresaj organizoj, insigno, dokumentoj, k. t. p.). Aliĝojn kaj kotizojn oni sendu al F-ino M. Larroche, 55 rue de Vaugirard, Paris (VI).

PROPAGANDA KONFERENCO POR ESPERANTO okazos dum la 5a Internacia Kongreso de «Internacio Katolika» en Zug, Svislando. Tiu kongreso pritraktos la problemon de raso kaj nacieco laŭ kristana doktrino kaj havos lokon sub la protektado de L. M. Kardinalo Bourne de Westminster. Multaj aliaj diverslandaj episkopoj partoprenos. La

«I. K. - Oficejo», Zug (Svisl.) invitas ĉiujn katolikajn samideanojn ĉeesti tiun gravan kongreson, kaj sin anonci.

LA INTERNACIA LIGO DE LIBERPESULOJ enkondukos la demandon pri esperanto, kiu estas enskribita en la tagordo de la proksima kongreso de la Internacia Federacio de Liberpensaj Societoj. Tiu kongreso okazos en Parizo de la 16a ĝis la 18a de aŭgusto 1925. La Int. Ligo deziras, ke liberpensuloj esperantistaj ĉeesti grandnombre. Ĉiu kiu intencas iri bonvole skribu al S-ro E. E. Yelland, 3, Fonthill Road, London, N. 4.

LA GRUPO ESPERANTISTA DE SAINT-OMER (Francujo) monhelpata de la Urbeŝtaro organizos Esperantan Ekspozicion de 28 Sept. ĝis 8 Okt. 1925 por kiu la Komerca Ĉambro cedos sian lokon. La grupo danke ricevos dokumentojn (poŝtkartojn, prospektojn, ĵurnalojn, k. c.) kaj rekompencos per speciala poŝtkarto.

STENOGRAFO POR ESPERANTISTOJ. — La Delegito de UEA en Dordrecht, S-ro B. P. Roubos, faris novan neŭtralan sistemon de stenografio por Esp. - Interesatoj ricevos senpage la unuan lecionon kun necesaj informoj.

AL GESTUDENTOJ. — Aliĝu tuj al «Internacia Studenta Esp. Asocio», kies celoj estas: 1e propagandi Esperanton inter la tutmonda gestudentaro; 2e per la praktika peresperanta laboro plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn: sciencajn, moralajn, materialajn, k. t. p. Kotizo estas Fr. Sv. 2.— lernantoj de superaj meslernejoj) kaj Fr.Sv. 5 por subtenantaj membroj. — Adreso de la nova sekretario: F-ino Lidja Zamenhof, str. Krolewska, 41, Varsovia (Polujo).

ESPERANTO - SERVO EN ĈESKE BUDEJOVICE (Ĉeĥoslovakio), senpage informas pri komercaj, industriaj, sociaj, negocaj k. a. demandoj pri Ĉeĥoslovakio. Ĝi peras ankaŭ eksporton kaj importon. Adreso: Jos. Ploss, Kizkova str. 6, Ĉ. Dudejovice.

VERDA KRUCO estas la nomo de malgranda, modesta kolego en la Esperantista Gazetararo. Ĝi estas la organo de la Esp. Tabakkontraŭula Asocio. Adreso: Wien 69, Postfach, Aŭstrujo!

ALVOKO AL LA BELGAJ ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ. — La internacia fervoja movado sendube ege interesas vin kaj vi ne ankorau estas membro de Esp. Fervojista asocio! Al ni mankis ĝis nun forta internacia asocio, kiu povas ĉiujn konvinki, ke Esperanto estas necesa interkomprenilo por samprofesiaj interrilatoj. Tiu asocio nun ekzistas. Membrigu do al la «Internacia Asocio de la Esp. Fervojistoj» (I.A.E.F.) Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ; sendu kiel eble plej baldaŭ vian aliĝon por ke nia asocio iĝu forta kaj vigla. Petu informojn de mi. A. F. Beirens, subestro de stacio en St-Niklaas W., Groote Peperstraat, 4.

MEMORAĴOJ PRI LA KONGRESO DE VERVIERS. — Restas provizo de ilustritaj poŝtkartoj kaj gvidlibretoj pri la kongresurbo. — Ni instigas ĉiujn Belgajn samideanojn ke ili helpu al niaj Verviers'aj ge-

amikoj, kiuj nenion ŝparis por la sukceso de la kongreso, kaj ke ili mendos kiel eble plej grandan kvanton da tiuj valoraj kaj utilaj propagandiloj, ĉu por si mem, ĉu por siaj amikoj aŭ grupo.

Prezroj: Serio de 7 kartoĵoj, Fr. 1.—, gvidlibreto, Fr. 1.—; mendante 12 unuojn, oni ricevas 13an senpage. Pagu al Poŝtĉekkonto 1516.10; alilandaj monbiletoj akceptataj.

KIU DEZIRAS INFORMOJN PRI «OOMOTO» (spirita movado), sin turnu al la Oomoto Propagando-Oficejo, Ajabe (Japanujo).

PLEZURA NOKTO.

(FINO)

Peĉjo kaj Karolĉjo, vidinte la policanon, kiel eble plej profunde sin kaŝis sub la kovriloj, ĉar ili jam scias laŭsperte, ke policanoj ne estas agrablaj homoj, kiam oni kontraŭas ilin. Peĉjo nevole frotas sian dekstran oreton, kiu antaŭ nelonge pro petolaĵo estis sub la manoj de policisto, kaj, sub la kovriloj, Karolĉjo mokridas:

«Hodiaŭ li faras nenion malbonan al vi, Peĉjo!»

«Nun lasu Benjon rakonti ĉion, kio okazis», diras s-ino Bovendam, metante sin apud la policanon kaj plaĉe rigardante lian sabron.

«Nu, sinjorino! mi scias ĉion», estas la respondo. «Ni iru supren nun kaj kaptu la ŝteliston. La sinjoroj nur akompanu min, mi petas, ĉar oni neniam scias, ĉu tiu sinjoro sin defendos aŭ ne.

«Ho Dio! Bovendam restu do ĉi tie! Vi estas tiel nerva! Kaj vi Kristiano, vi tiel grave malvarmumis!»

«Venu, sinjoroj, ni iru; estas nur afero de unu momento. Kiam ni estos kaptintaj lin, ni mankatenu lin, kaj poste: al la policoj!»

«Ĉielo! Kiel kuraĝa estas tia homo», admire diras Manjo.

«Nu, tio estas lia metio», la sinjorino malkviete diras, vidante ke ŝiaj filo kaj edzo sin preparas por sekvi la policanon. Ŝi denove riskas, dirante:

«Bovendam! pensu pri viaj infanoj».

Vane! La dommastro sentante la tutan gravecon de sia personeco, iom lakone, respondas: «Ni tuj kaptos lin!» kaj per gesto, inda je la plej fama teatra aktoro, li prenas la fornhokon. Kristiano sin armas per bototirilo, kaj formas la postgvardion.

La trio preterpasante prenas la perditan ŝlosilon en la geedza ĉambro, kaj, singarde, supreniranta la ŝtuparon, alvenas antaŭ la ĉambropordo de Benjo.

«Silentu! sst!» flustras la policano, «aŭskultu ni unue. «Poste li senbrue puŝas la ŝlosilon en la pordon kaj, mallaŭte aldonas, malantaŭenirante unu paŝon: «Kiam mi malfermas, vi ambaŭ puŝas la pordon kiel eble plej forte, ĉar eble li embuske atendas por elkuri, kiam la pordo malfermiĝas. Se li kontraŭstaras, frapu lin sur la kapon».

Bovendam tremegas pro timo; ĉiuspecaj teruraj pensoj fulmrapide traflugas lian spiriton. «Ĉiele!» li pensas, «se tiu fripono nin atendus kaj frapus al ni per ponardo. Huh!» Li frostotremas; la lumo skuiĝas en lia mano.

«Atentu la kandelon, sinjorino! Ne timu; kiel mi diris: frapu nur sur...»

Kristiano premege la bototirilon en sia mano.

«Nu, sinjoro! atentu», diras la policano, kaj sin pretigas por malfermi.

«Ĉu vi lin jam tenas?» subite eksonas sufoka voĉo malsupre. Estas sinjorino Bovendam, kiu vokas, starante ĉe la ŝtuparo.

«Mi certe malsaniĝos pro tiu afero!» diras Manjo, morte terurigita.

«Manjo! Panjo! Ĉu mi nun povas vidi lin?» krias Karolĉjo el sia lito, kaj Peĉjo staras nudpiede en la mezo de la koridoro.

«Rapidu! en la liton, bubaĉo!»

«Sed, Manjo, mi tiel ŝatus vidi lin; Kristiano tamen ankaŭ povas ĉeesti.

«Ne! En la liton, knabaĉo!» krias Manjo.

Dume la policano estas eliginta la sabron kaj li skue malfermas la pordon.

Patro kaj filo tiel forte puŝas la pordon ĉe la muron, ke la tapeto ŝiriĝas, kaj la ĉarniroj akre knaras kaj grinças.

En la ĉambro estas neniu; morta silento! Singarde la policano alproksimiĝas de la lito.

«Flankentenu la kandelon, sinjoro, por ke mi rigardu sub la liton. — Vere! Tie li kuŝas». La policano montras la piedojn, kaj, laŭtigante la voĉon, li krias:

«Ne restu tiel trankvila, knabo; ni tamen tenas vin! Elsubiĝu, mi petas; vi certe erare alvenis tien? — Hop! Venu do! Au, ĉu mi devas tikli vin per mia sabro?»

Morta silento!...

«Ho! Dio! Ili tenas lin!» diras la voĉo de la sinjorino malsupre de la ŝtuparo.

«Peĉjo! Karolĉjo» je l'nomo de Dio enlitiĝu», diras Manjo. — Nu, sinjorino! diru vi do al tiuj sentaŭguloj, ke ili foriru.

Benjo forigas la infanojn.

«Kion vi pensas? Ĉu plaĉas al vi veni ĉi tien aŭ ĉu ne?» denove krias la policano kun kolera blasfemo, sed tiel laŭtege, ke la virinoj subite retirigas.

Silento kiel en tombo...

«Vi ne povas pensi, ke la afero finiĝos tiamaniere; ni tre bone vidas vin, amiko mia! Nu ankoraŭ mi diras: venu de sub la lito!»

Nenia respondo...

«Jen, tenu mian sabron, junulo, mi ekkaptos lin.»

Kristiano prenas la armilon; la policano kliniĝas, ekkaptas la piedojn kaj tenas paron da pantoflojn en la manoj, kun kiuj li falas malantaŭen ĉe la muron.

Bovendam, pro timigo, lasas fali la kandelon, sed feliĉe ĝi daŭras bruli, kaj Kristiano ĝin prenas.

«Lumigu, iom, junulo! Mi kredas, ke via fratino estas ege trompiĝinta», ridante diras la policano, kiu estas kuŝiĝinta sur la genuoj kaj palpe serĉas sub la lito.

Bovendam ekkomprenas ĉion, kaj kiam la policano el sub la lito prenas kelkajn rulojn da tapetpapero kaj volvitajn tapiŝeton, li tute komprenas.

«Ha! ha! ha! ha! — estas la pantofloj de la tapetisto; li hodiaŭ laboris tie ĉi», li ridegas. «Ha! ha! ha! li ordigis ĉion kaj li almetis la pantoflojn sur la rulojn; morgaŭ li revenos, por riparteksi la tapiŝeton kaj tapeti la pordon. Pri tio ni ne pensis. — Ha! ha! ha! ha!»

«Ha! ha! ha! ha!» ridas Kristiano, dum li sidigas sur seĝon.

«Estas vere, sinjoro! Vi ektimis pro nenio», respondas la policano, kiu, levigante, senpolvigas siajn genuojn. «Ekzistas nenia danĝero. Vi eble estas tre nerva, ĉu ne? Iom timema?»

«Ne precize tio, sed... mia filino, ĉu ne... ŝi kredis, ke..., ŝi pensis..., ŝi opiniis... Ha! ha! ha! ha! la pantofloj de la tapetisto...»

Kristiano estas releviĝinta kaj vokas malsupren:

«Panjo! Benjo! Manjo! venu rapide! Ni tenas lin!»

«Nu, sinjoro — estas pli bone tiel, sed mi nepre devas fari protokolon, se ne mi ne povas pravigi, ke mi forlasis mian sekcion. Estas komika okazintaĵo! Ha! ha! ha!»

La sinjorino kaj la aliaj estas suprenvenintaj, pro la laŭtega ridado, kaj konsternite ili rigardas la du eluzitajn pantoflojn, kiujn la sinjoro tenas en la mano.

«Ĉu do ne estas ŝtelisto, ĉi tie, paĉjo?» demandas Karolĉjo.

«Ne, karulo mia, — tute ne.»

«Hej, tio estas bedaŭrinda, paĉjo!» diras Peĉjo.

«Nu, sinjoro! Mi do foriras, Morgaŭ vi devos iri al la policoficejo, pro la protokolo.»

«Ĉu tio estas nepre necesa, amiko?»

«Jes, sinjoro, vi ne povas eviti tion. Se mi silentas, tiam, kompreneble, ... sed...»

«Mi komprenas! Nu, mi preferas, ke vi silentu, pro mia filino». — Benjo ŝtelforiras malsupren. — »Kaj ankaŭ estas iomete ridinde, por la najbaroj, amiko!»

«Jes, sinjoro, koncerne tion, estas komika okazintaĵo. Vi komprenas, ke via timemo estas la kaŭzo de ĉio.»

«La nekonigo de la afero valoras por mi kelkajn guldenojn.»

«Nu, sinjoro, ĉar estas vi; estas malpermesite al policanoj akcepti trinkmonon, sed, konsiderante, ke la fraŭlino — viaj propraj nerveco kaj timemo — nu...!» La dekstra mano de la policano faras geston, kiun Bovendam bonege komprenas.

La servisto de la leĝo foriras, post multfoja ripetado, ke neniu ekscios ion pri la afero. Kaj kiam finfine la tuta familio Bovendam denove estas enlitiĝinta, la sinjorino diras:

«Petro, estus tamen preferinde transloĝiĝi en la malnovan urbon; tie ĉi en tiuj novaj stratoj oni ja ne estas kvietaj!»

Bovendam malbonhumore sin turnas, kaj nur diras:

«Estas plezura nokto!»

Tradukis M. BOEREN.

BIBLIOGRAFIO.

SALTEGO TRANS JARMILOJ. Romano originale verkita de Jean Forge. — Eldonita de Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig. 1924. Esperanto-Fako. 196 paĝoj: 23.5 × 20 cm. Prezo: Orm. 4.50.

Tiu romano estas certe unu el la plej interesaj kaj atentokaptaj produktaĵoj de nia originala literaturo. Temas pri la «Co-radioj» malkovritaj de la scienculo Fromaĝi, dank'al kiuj la malkovrinto, lia familio, la edukistino, fraŭlino Snob, la geservistaro kaj du amikoj kapablas vojaĝi en la pasintaĵo kaj vizitas dum kelka tempo la antikvan Romon je la epoko de imperiestro Nerono.

Oni facile imagas la sennombrajn, strangajn kaj amuzajn aventurojn okazantajn al la gevojaĝantoj! La fantazia imagpovo de la aŭtoro riĉe disvolviĝas, en tiuj ducentoj da paĝoj, tra rakontado ĉiam alloga, interesa, flua, tre belstila kaj la leganto ĉeestas, kunvivas la okazantaĵojn!

La aŭtoro uzas senŝpare novajn vortojn, plej ofte tuj kompreneblajn; li faras iafoje trafajn kunmetaĵojn; alfoje la kunmetaĵoj ŝajnas malpli sukcesintaj; iafoje ankaŭ nekorektaj. Generale tamen la verko estas ege rekomendinda kaj la nomo de l'aŭtoro estas memorinda, ĉar posedante en si la veran «ŝtofon» de talenta romanverkisto, li certe fariĝos, se li daŭrigas, unu el la plej famaj literaturistoj mondlingvaj.

AVENTUROJ DE MALSPERTULO (fragmento de la verko) de Robert Reitzel; esperantigis Dro Tobias Sigel — 1924 — Esperanto Verlag Ellersiek kaj Borel — Berlin kaj Dresden — Prezo 1.20 Orm. — La malspertulo estas la aŭtoro mem, kiu vojaĝis Usonon dum sia junaĝo por trovi porviron kaj kies komenca restado en la Nova Mondo estis intersekvo de mizeroj, de suferadoj, de seniĝadoj kaj mankoj, kiujn li rakontas kun neelĉerpebla bonhumoro, ne ŝparante tamen merititan ungoŝkrapon al tiu aŭ alia riĉa senkorulo. La traduko estas entute bone farita, kvankam ĉi tie kaj tie la atenton de l'leganto trafos ĉu vorto malbonsence uzita, aŭ ne ĝuste kunmetita, ĉu esprimo tro laŭvorte tradukita, ĉu gramatika nekorektaĵo.

(Ekzemploj: kompanio, anst. kunularo aŭ ĉeesto; sklavoforejo; anst. sklavofiro; «ĉio bone marŝis»; anst. sukcesis; la adiaŭo de tiu arbara idilio, anst. «al»; Ĉio estis plenegita per laboristoj, anst. «de»; laboro kio, anst. kiu.)

LA PAN-EŬROPA MANIFESTO de R. N. Coudenove - Kalergi ;
esperantigis D-ro Edm. Sos; eldonejo Paul Knepler, Wien, Lichtensteg,
1. Prezo: 0.50 sv. frk.

Tre korekta traduko de kelkpaĝa alvoko al la Eŭropaj Ŝtatoj por ku-
niĝi en Federacio, por firmigi kaj certigi la mondan pacon kaj la son de
Eŭropo je la triobla vidpunkto politika, militista kaj ekonomia.

LA SENDANĜERECO DE FRANCUJO (tekstoj kaj dokumentoj) de
André Honnorat, senatano, eks-ministro, Paris. L'idée française à l'é-
tranger, 11, place de la Bourse, 1924. — Eldonaĵoj de la Societo de la
Historio de la Milito. Bonege Esperantigita de grupo de la plej spertaj
francaj Esperantistoj sub revidado de S-ro Grosjean-Maupin, tiu 150-
paĝa broŝuro estas taŭgega ekzemplo de la kapableco kaj fleksebleco
de Esperanto en politika kampo. Ĝi helpu malfermi pli kaj pli la okulojn
de la skeptikuloj, ĉefe de la oficialuloj, pri la nesupereblaj meritoj de
la mondlingvo!

TRI LIRIKOJ DE SHAKESPEARE, muziko de Matthew Francis Coa-
tes, presbitero M. A. Oxford; vortoj tradukitaj de Archibald John Ash-
ley, presbitero. Prezo per poŝto: 1 ŝil, 7 p.; 1924, eldonita de A. J. Ash-
ley, Farnley Tyas, apud Huddersfield, Anglujo.

La tri eltiraĵoj el la Shakespeare'a verkaro estas: Madrigalo (el Mea-
sure for Measure, akto 4, sc. 1), Fidele (el Cymbeline, akto 4, sc. 2)
kaj Carpe diem (el Twelfth Night, akto 2, sc. 3).

La tradukoj ŝajnas al mi iom krudaj pro la senĉesa apostrofado de la
«o» substantiva; ankaŭ iom tro sinteza kaj pro tio ne facile komprene-
bla. Kiel muziko tiu de la tria eltiraĵo plej plaĉas al mi kaj estas laŭ
ni la plej sukcesinta.

L. C.

IOM DA ALGEBRO.

Oni vidas la unuan uzon de la komo, disiganta la entjerajn ciferojn
de la decimalaj, en la Aritmetiko de Frances Pellos, verkita en la en
la Nic'a dialekto kaj publikigita en Torino en 1492, la jaro de la mal-
kovro de Ameriko.

Ni notu ankaŭ ke la signoj + kaj — de la sumigo kaj de la depreno
nur aperas en verko, presita en 1489; estas en la Aritmetiko de Johann
Willmann, publikigita en Leipzig'o.

La signo = aperis en angla verko, «The Whetstone of Witte» de
Robert Recorde, en Londono en 1557. La simbolo: de la dividado deve-
nas ŝajne de iu Rahn; kaj la angula signo, kiu laŭ sia direkto signifas
«pli granda ol» aŭ «pli malgranda ol» vidiĝas en neniu alia verko antaŭ
la «Artis analyticoe praxis» en Londono en 1631.

Oni do rimarkas, ke la skribmaniero de nia aritmetiko bezonis mul-
tan tempon por sia plena starigo.

BANKO CRÉDIT POPULAIRE

Kooperativa Societo

STATIEPLEIN, 2-3, PLACE DE LA GARE

ANTVERPENO

BANKNEGOCIOJ

Pruntedono sur urbaj obligacioj k.

aliaj valorpapiroj

Aĉeto kaj vendo de akcioj, fremda

mono kaj kuponej

CEKOJ SUR CIUJ LANDOJ

Hipotekoj je mallonga kaj longa tempo

Malfermoj de kredito

Antaŭpagoj sur komercaĵoj

MONDEPONOJ

Sparkaso 4.25 Kuranta konto 3.50 o/o

eponinto povas ĉiutage senaverte

disponi la monon deponitan en Spar-

kaso kaj kuranta konto.

DEPONOJ JE DIFINITA TEMPO

3 monatoj 4.75 — Unu jaro 5.50 o/o

6 monatoj 5.25 — Tri jaroj 6.00 o/o

Impostoliberaj

Feraj monkestoĵ de po Fr. 10.— jare.

KIE AĈETI PLEJ BONE MAL-
KARE KAJ FIDINDE OL ĈE LA
BONEKONATA FIRMO

V. Vloeberg

Juvelfabrikanto kaj horlogisto

Rue du Serment, 17 - Malines

Speciala laborejo por riparado

" PLUMET, "

La plej bona el la digestigaj likvoroj

CIE AĈETEBLA

Distilejo de bongustaj likvoroj LE PLUMET

Place St Bavon, 14, St Baafsplein

GAND - GENT

Hotelo - Restoracio - Kafejo

== RUBENS ==

Rue Neuve St-Pierre 10-12 - GENTO - Telefono 418

Posedanto: Leopold VAN WAES

MANGOJ LAŬ LA KARTO. — SPECIALAJ MANGAJOJ.

Salonoj por festenoj kaj festmangoj - Laŭburĝa kuirmaniero - Bonaj vinoj

La Vojagoj Vincent

59, Boulevard Anspach, BRUSELO (Borso). - Tel. 101.77

Organizas, en ĉiu tempo de l'jaro, vojaĝojn komunajn, apartajn kaj edziĝajn, en ĉiuj landoj

La Belgaj Aŭto-Veturadoj

per la belegaj kaj rapidaj ekskurs-aŭtomobiloj de la
VOJAGOJ VINCENT

Ekskursoj en la G. Dukl. Luksemburgo, en la valoj de Amblève, Semois, Ourthe, en la ĉirkauaĵo de Bruselo. Petu senpagan alsendon de vojaĝplanoj kaj projektoj.

Fabrikejo de vojaĝartikloj

FIDINDA FIRMO

AU LÉZARD

140, Boulevard Anspach, 140

(apud la Borso)

Telefono 225.94

BRUSELO

Luksaj vestokestoj.
Garnitaj kestetoj.

Vojaĝkofroj - Sakoj - Paperujoj.

Specimenkestoj por bombonistoj.

Riparado. — Transformado.

Fabrikejo de Fortepianoj

G. Van Bastelaere

26, Brusselsche Straat, 26

GENTO

TELEFONO 4275

Vendo — Aĉeto — Interŝanĝo —
Agordado - Transporto - Riparo, k.c.
de Fortepianoj kaj harmoniumoj.

Liveranto al Monaĥejoj. Edukejoj
kaj Societoj.

Luksaj kaj ordinaraĵoj fortiepianoj.

J. OOSTERLINCK-VAN HERREWEGE

VENSTERGLAS -- SPIEGELRUITEN

185, Brusselsche Steenweg, LEDEBERG (GENT)

Ne forgesu

repagi vian abonon!

VIZITU BRUGES (BELGUJO)

arta urbo je 15 Km. de la Norda Maro

kaj haltu:

HOTEL DU CORNET D'OR

2. PLACE SIMON STEVIN

Sidejo de la Bruĝa Grupo Esperantista.

Centra situacio je 2 minutoj de la Stacidomo.

Tre komfortaj ĉambroj, bonaj manĝaĵoj, bonaj vinoj kaj tre
moderaj prezoj.

La hotelestro, samideano S-o Verbeke, parolas Esperante, france, flandre kaj angle

BANQUE de la FLANDRE OCCIDENTALE

Anonima Societo fondita en 1881

56, Rue Flamande, 56 — BRUGES — Telefono 89

Agentejoj en Blankenberghe, Heyst kaj Knocke

DISKONTO

KREDITKONTOJ

MONSANGO

Pruntedono sur obligacioj kaj ĉiuj valordokumentoj — Depono de Akcioj
Borsmendoj por ĉiuj urboj.

ANTAŬMENDOJ—REGULIGOJ

Pago de kuponoj — Eldono de ĉekoj — Kreditleteroj

Aĉeto kaj vendo de fremdaj mono kaj biletoj — Luigo de monkesto.

Multaj oficistoj parolas Esperanton

S. D.

? Ĉu vi estas jam
membro de U. E. A. ?

SAMIDEANOJ! KURAGIGU ESPERANTISTAJN FIRMOJN!

Por via somera ripozloko ap. d. Marbordo, elektu:

LE GRAND HOTEL D'OOSTDUINKERKE

(Korespondas per Esperanto. — Parolas Esperante).

AGRABLA RESTADO DUM TUTA JARO

BONAJ MANGAĴOJ. BONAJ VINOJ. TRE MODERAJ PREZOJ.

Generala agentejo por vendado de Francaj vinoj, oleoj,
Skribu al S-ro BENOIT, Grand Hôtel d'Oostduinkerke.

El ĉiuj enspezoj farataj pere de Esperanto, S-ro Benoit dedikas parton
de 5 o/o al la propaganda kazo de «Belga Esperantisto»,
de 5 o/o al la propaganda kazo de «Belga Esperantisto».

Belga Manufakturo de Industriaj Produktoj

Societo anonima (Fondita en 1872)

18, RUE NEUVE, 18 -- LEDEBERG - APUD - GENTO

TELEGRAF-ADRESO: " PERFECTA ", GENT

TELEFONO: 635

Dozitaĵ analiziloj por la uzado de la industriaj akvoĵ.

Logika purigo per purigaj aparatoj aŭ en kaldronegoj kun aŭ sen aparatoj.

Senpero importado de industriaj oeloj kaj grasoj.

Stupo. Kauĉuko. Klapoj. Rimenoj.

Kotonrestaĵoj por purigi maŝinojn.

NEW ENGLAND

RUE AUX VACHES -- GENTO

TELEFONO 618

Antaŭfaritaj kaj laŭmezuraj vestaĵoj

AU BON GOUT

NOVAĴOJ KAJ LANAĴOJ

por sinjorinoj

Artikloj el silko kaj veluro

Edzino De Groote-Van de Velde

30, RUE DIGUE DE BRABANT, 30

Specialeco de Negliĝoj

Bluzoj kaj Jupoj

GENTO

Espéranto en un coup d'œil!

PERANTO est
ONETIQUE.

prononce toutes les
lettres:

Une lettre,
un son.

CENT TONIQUE

se toujours sur
la dernière syllabe.

d'irrégularités.

d'exceptions.

L'ALPHABET DE L'ESPERANTO

A a	B b	C c	Ĉ ĉ	D d	E e	F f	G g
a	b	ts	tch	d	e	f	gu
G ĝ	H h	Ĥ ĥ	I i	J ĵ	J ĵ		
d	h	aspire h très spiré	i	y			
K k	L l	M m	N n	O o	P p	R r	S s
k	l	m	n	o	p	r	ss
Ŝ ŝ	T t	U u	Ŭ ŭ	V v	Z z		
ch		ou	ou brej	v	z		

Q, W, X et Y n'existent pas.

A, E, I, O, U se prononcent comme dans
fa, ré, mi, do, roule.

C ne sonne pas comme S,
oi comme K
mais comme ts de tsar.
I = y dans yeux.

Les sons
ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, et ŭ
se retrouvent dans
tchèque, adjudant,
Aachen, jardin, chemin
et Raoul.

La GRAMMAIRE se compose de SEIZE RÈGLES FONDAMENTALES.
Les MOTS se forment au moyen de radicaux auxquels s'ajoutent des lettres appropriées.
est la terminaison du SUBSTANTIF; L'ADJECTIF se termine en

fakto	libro	evidenta	bela	furioza	simpła
telefono	fajro	longa			
piano	tasko	granda			

SUBSTANTIFS et les ADJECTIFS forment leur PLURIEL par l'adjonction de J (aj, oj se prononcent comme dans ail et Boëeldieu).

SIX TERMINAISONS SUFFISANTES POUR FORMER TOUS LES TEMPS SIMPLES DU VERBE

Présent	Passé	Futur	Conditionnel	Impératif
AS	IS	OS	US	U
estis	estis	estos	estus	estu
lernas	lernis	lernos	lernus	lernu
instruas	instruis	instruos	instruus	instruu

forme l'ACCUSATIF (complément direct) Les ADVERBES se terminent en E

ESTU PRETA; LERNU ESPERANTO

Les PARTICIPES s'emploient comme adjectifs, substantifs et adverbos
Actif: Présent: -ANT Passé: -INT Futur: -ONT
Passif: Présent: -AT Passé: -IT Futur: -OT
Mi estas instruanta Mi estas la instruanto Instruante, mi lernas
Vi estas instruala Vi estas la instruato Instruato, vi lernas.

harpo	lilio	melono	hundo
piano	rozo	banano	kato
violono	tulipo	figo	kamelo
fluto	violo	piro	elefanto
orgeno	geranio	pomo	urso

Oui se dit JES et Non se dit NE

tasko	estas simpla	Le préfixe	mal simpla	COULEURS
piano	(est) granda		mal granda	blanka papero
knabo	estis bela		malbela	blua kraĵono
raporto	estail labora		mal labora	nigra inko
progreso	estos rapida	infixe	mal rapida	bruna tero
anekdoto	(sera) longa	le contraire.	mal longa	rozaj lipoj

DE NOMBRE: Unu, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, sep, ok, naŭ, dek; cent, 100; milo, 1000; miliono. ADJECTIFS NUMEREAUX ORDINAUX: unua klaso, dua klaso, etc.
comme Adverbes: unue premièrement; due, deuxièmement; etc.

PROFES-IST dentisto bakisto
s'indique par artisto
Le SEXE FÉMININ IN princo princino
patro patrino
leono leonino

autres préfixes et vingt autres suffixes permettent d'exprimer toutes les idées et ce avec une précision et de clarté.

Modelo de lingva simpleco :

- ESPERANTO -

Modelo de aŭtomobila simpleco :

Ford

Petu informojn pri la laŭvola
pagsistemo ce la plej
najbara Agento

Aŭtomobiloj

Sargveturiloj

Motortiriloj

REPREZENTANTOJ CIE!